
DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ N-ro 4 (841) 2003 ✪

## VOJAĜO RENKONTE AL HOMOJ KAJ LOKOJ



## MILITO?

## Kristanismo, Biblio, rakontoj, libroj, kongreso

## KELI

*doj, la Ĥividoj kaj la Jebusidoj*"? Ni ne forgesu, kiam oni skribis tiun leĝon. Estis ne antaŭ la oka jarcento antaŭ Kristo, en tempo, kiam la cititaj popoloj ne plu ekzistis, ĉar ili kaj la Izraelidoj jam intermiksiĝis, kunfandiĝis, jam estis unu sola popolo. Alivorte la situacio estas, kvazaŭ iu hodiaŭskribita leĝo en hodiaŭa Germanio permesus mortigi ĝermanojn, sed ne germanojn. La ĝermanoj, la pra-antaŭuloj de la hodiaŭaj germanoj, ja vivis antaŭ pli ol mil jaroj kaj jam longe ne plu ekzistas.

Sed se la leĝo pro „neekzisto de viktimoj" neniam estis uzebla, kial la bibliaj aŭtoroj enskribis ĝin? La kunteksto klarigas: „*16 Sed al tiuj urboj de tiuj popoloj, kiujn la Eternulo, via Dio, donas al vi kiel posedaĵon, lasu la vivon al neniu animo; 17 sed ekstermu ilin: la Ĥetidojn kaj la Amoridojn, la Kanaanidojn kaj la Perizidojn, la Ĥividojn kaj la Jebusidojn, kiel ordonis al vi la Eternulo, via Dio; 18 por ke ili ne instruu al vi fari simile al ĉiuj iliaj abomenaĵoj, kiujn ili faris por siaj dioj, kaj por ke vi ne peku antaŭ la Eternulo, via Dio*". La cititaj popoloj estas simbolo por tio, ke Izraelidoj forlasis sian Dion kaj akceptis aliajn diojn kaj iliajn abomenaĵojn. Ekzemple kelkaj aliaj dioj postulis murdon de infano kiel oferdono por siaj altaroj. Do la teksto admonas, ke estas eraro, forlasi la veran kaj unununuran Dion, la Dion de Izraelo.

Sed kio pri la militoj en Josuo? Tiun ĉi libron oni komponis en la tempo de la ekzilo en Babilono (inter 587 kaj 539 antaŭ Kristo), do post la plej terura malvenko de Izraelo. En tiel mizera situacio la libro rakontas pri la glora pasinteco, kiam la popolo obeis al Dio kaj Dio mem militis por sia popolo. Laŭ la opinio de la aŭtoroj kaj laŭ la avertoj de la profetoj antaŭ la katastrofo de la jaro 587 a. K. , Izraelo riskis kaj perdis la helpon de sia Dio pro propra kulpo: ĉar ili akceptis aliajn diojn, ĉar la potenculoj rabis la posedaĵon de la senhelpuloj, la juĝistoj juĝis laŭ subaĉeto...

Do ni legu en Josuo teologian veron, ne historiecan raporton pri militoj ĉirkaŭ la jaro 1200 a. K. (Ne forgesu, ke inter la jaro 1200 a. K. kaj la jaro 587 a. K. estas kelkaj jaretoj.). Cetere, arkeologoj elfosis Jeriĥon kaj konstatis, ke Jeriĥo jam estis ruino *antaŭ* la alveno de la Izraelidoj. Sekve la arkeologio kongruas kun la tezo, ke la teksto ne volas prezenti la historiecan veron.

Tamen restas en mia koro la problemo, ke la aŭtoroj prezentis dion militanto. Ili kredis, ke Dio povus tiel agi. Tiutempe dio militanta estis — en antikva tempo tutnature — dio kun potenco protekti. Ĉu tiu ĉi ideo ankoraŭ hodiaŭ validas?

Nun decidu mem, sed ne forgesu, kiel Jesuo argumentis en siaj famaj „antitezoj" en Mateo 5:17-48 — emfazinte la validecon de la leĝo kaj la profetoj — tio estas la malnova testamento: („*17 Ne pensu, ke mi venis, por detrui la leĝon aŭ la profetojn; mi venis, ne por detrui, sed por plenumi. 18 Vere mi diras al vi: Ĝis la ĉielo kaj la tero forpasos, nek unu joto nek unu streketo forpasos de la leĝo, ĝis ĉio plenumiĝos*"), li efektive interpretis kelkajn el ĝiaj ordonoj kontraŭ la laŭvorta senco. Kial? Ĉar li intencis prezenti al la homoj la veran volon de lia patro, li povis kaj respekti la biblion kaj kritiki en ĝi tion, kio ne kongruas kun la vera volo de Dio.

Ni serĉu la veran volon de Dio!

Wolfram ROHLOFF





# LA NE-ELDIRITA PAROLADO DE LA USONA PREZIDENTO G. W. BUSH POST LA 11a DE SEPTEMBRO 2001

Je la 11a de septembro 2001 la mondo transformiĝis. Per nekomprenebla teroro, al ni okazis io horora. Tiu estas horo de FUNEBRO, sed ankaŭ de PRIPENSADO. Solene mi deklaras hodiaŭ antaŭ la usona popolo kaj antaŭ la tuta mondo, ke ni usonanoj ne faros ion eĉ nur proksimume tiel teruran kontraŭ iu lando de la tero.

Ekzistas homoj, kiuj malamas nin tiom, ke ili etendas teroron super ni kaj sendistinge mortigas homojn. Sed ni ne permesas, ke tiaj homoj diktu al ni la leĝojn de nia propra agado. Ilin blindigas malamo. Sed ni ne transdonos nin al malamo. Ni ne respondos teroron per teroro.

Jen iuj deklaris al ni militon, sed ni ne permesas ke iu trudu al ni militon. Tiuj atencoj estis ATAKO KONTRAŬ ĈIUJ VALOROJ DE CIVILIZACIO. Sed ni ne permesas, ke iu rabu de ni nian civilizon. Ni donos respondon, rezolutan, inteligentan, prudentan respondon, sed respondon civilizitan.

Kiel ni povus esti fideblaj en nia lukto kontraŭ malrespekto al la homoj, se ni mem aplikus rimedojn malrespektajn al la homoj? Ni luktos kontraŭ terorismo, sed bazante nin ne sur venĝo sed sur juro. Antau ĉio, ni ne kaŭzos novajn TIMOJN EN LA ARABA MONDO pri krucmilito. Malnovajn malamiko-kliŝojn ni lasas post ni. La novan jarmilon neniel inaŭguros nova milito, sed granda, mondvasta alianco kaj ofensivo kontraŭ teroro kaj perforto.

Por tio, ni turnos nin, komune kun ĉiuj ŝtatoj apogantaj nin sur tiu vojo, kontraŭ monolavado, korupto, organizita krimo kaj mafiecaj implikoj, se necese ĝis en niaj propraj politikaj strukturoj. Internacie ni kunlaboros police por malkovri planatajn atencojn kaj observadi suspektatojn.

SED POR DEPRENI DE TERORISMO SIAN GRUNDON EN LONGA PERSPEKTIVO, ek de nun, kun ĉiuj niaj politikaj kaj financaj, personaraj kaj moralaj fortoj, ni engaĝas nin por la sociaj kaj demokratiaj rajtoj en nia lando kaj sur la tuta tero. Ni postulas la protekton de malplimultoj en kiu ajn lando. Al ĉiu ŝtato ni apelacias, ke oni zorgu pri la observo de homaj rajtoj, tuj abolu tortur-kelojn, luktu kontraŭ sklava kaj infana laboro kaj garantiu virinajn rajton. Ĉi postulo ne estas diskutebla.

Krome mi ordonas tujan haltigon de ĉia LIVERADO DE ARMILOJ el nia lando al regionoj de milito kaj krizo. Ni ne povas pli longe toleri, ke ni mem liveru armilojn al homoj, kiuj poste eventuale endanĝerigos la mondan pacon kiel teroristoj. La aliajn landojn, kiuj produktas aŭ liveras armilojn, mi invitas age same.

Simile, ĉiuj landoj senprokraste starigos programojn por deklari MALSATON KAJ MIZERON la MALAMIKO NUMERO UNU de la homaro. Dum ĉiutage mortas pro malsato aŭ subnutro 24 000 homoj, ne eblas paco. La bazaj rajtoj je nutro, loĝo, eduko kaj medicina baza prizorgo estu tuj garantiataj. Ĉi postulo ne estas diskutebla, ĉar ĝi jam estas la deklarita volo de la monda komunumo en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Por tiu celo ni disponigas dek miliardojn da dolaroj, kaj ni invitas ĉiujn milionulojn kaj miliardulojn en la mondo disponigi por la sama celo almenaŭ la dekonon de siaj posedaĵoj. Sed eĉ nur unu procento de la enspezoj de la plej riĉaj 200 personoj sur la tero havigus

8 miliardojn da dolaroj, kiuj uzeblus por la nomita celo.

Tiel, tre baldaŭ ni notus videblajn sukcesojn. Pliaj programoj tiukampe enhavus batalon kontraŭ AIDESO, precipe en Afriko; reintegradon de iamaj infanoj–soldatoj kaj infanoj–prostituitoj, batalon kontraŭ misuzo de narkotaĵoj kaj komercado de narkotaĵoj, helpon por kultivantoj de kokao kaj opio por transiri al produktado de bazaj nutraĵoj, plibonigon de la infra–strukturo kaj edukado en ĉiuj mizer–kvartaloj.

Kromajn 5 miliardojn ni investos en RENKONTO–CENTROJ por malsamaj nacioj, rasoj, religioj kaj kulturoj sub la signo de kulturo de paco, pac–esploro kaj pac–laboro. Ĉiujn religiojn ni invitas doni dekonon de siaj rimedoj por interreligia kompreniĝo kaj renkonto. Ni postulas ke ili estu inter si toleremaj kaj pacemaj. Ni apelacias ankaŭ al ĉiuj ne–religiaj homoj, ke ili konsciiĝu pri la bazaj valoroj de homeco kaj laboru favore al ili.

PASINTECE, NI FARIS MILITOJN au forigis registarojn, kiuj ne plaĉis al ni. Je tiu loko, en la nomo de la usona popolo, mi volas esprimi mian profundan bedaŭron al ĉiuj koncernaj homoj kaj popoloj. Estis ja ankaŭ unu 11a de septembro, tiu de la jaro 1973, kiam, helpe de nia Sekreta Servo, en ĈILIO ni renversis la registaron de ALLENDE — prezidanto, kiu ĉiutage disdonigis duonan litron da lakto al ĉiu infano. Ni bedaŭras, ke en la landoj de Suda Ameriko ni apogis reĝimojn, kiuj subjugis sian landon per diktatoreco kaj torturo. Tio ne estas inda je humaneca monda potenco.

Ni bedaŭras, ke en la nomo de libereco, ni senfoliigis VJETNAMION kaj mortigis centmilojn da homoj. Mi pardonpetas ankaŭ ĉe la IRAKA POPOLO pro la milionoj da viktimoj, precipe da infanoj, kiuj mortis sekve de la golfa milito pro subnutro kaj misformiĝoj pro la urania municio kiun ni uzis. Hodiaŭ, sciante kion senkulpaj viktimoj devas suferi, ni promesas, ke neniam plu ni konsideros homajn vivojn „flankaj difektoj" — kolateralaj damaĝoj. Ĉiu vivo estas senfine valora. Sed ANKAŬ ĈIU ALIA VIVO SUR TIU TERO ESTAS VALORA KAJ PROTEKTINDA. Tial kiel nacio ni ne pli longe kontraŭstaros la protokolon de Kyoto por protekti la mondan klimaton, sed antaŭenigos alternativajn energiojn, draste reduktos la emisiojn de nocaj substancoj, kaj helpos al la malriĉaj landoj trovi pli inteligentajn solvojn por ilia energio–produktado ol tiu praktikata de ni. En tiu kunteksto, la tuja ĉesigo de atoma energio urĝe necesas, ne laste pro tio ke atomcentraloj povas fariĝi celtabuloj por terorismaj atakoj. Sed ni ankaŭ helpos bori akvon en la dezerto, apogi sun– kaj vento–energion, kaj tutmonde subtenos plantadon de arboj. Por tio ni donos kromajn 5 miliardojn, kiuj servos al la monda paco pli ol la mobilizo kaj aktivigo de grandegaj armeoj kaj detru–armiloj.

Plu, mi deklaras hodiaŭ: Ni rezignos ĉian PRETENDON DE HEGEMONIO. Mi havas revon: la revon de mondo, en kiu libero kaj rajtoj estos la libero kaj rajtoj ne nur de la potencaj kaj riĉaj. Kune kun ĉiuj homoj, organizoj kaj registaroj, kiuj volas labori por pli bona ESTONTECO DE NIAJ INFANOJ, ni utiligas la historian horon, por ke realiĝu plejeble granda bonfarto, justeco, paco, kaj per tio, sekureco. La usona popolo komisiis al mi aŭtoritaton por fari ampleksajn decidojn. Pro respondeco antaŭ Dio, antaŭ mia popolo kaj antaŭ la estonteco de niaj infanoj, mi decidis radikale ŝanĝi nian kurson.

Ni estas nur homoj kaj ni ne sukcesos ekstermi ĉion malbonan en la mondo. Sed mi havas vizion, kiun mi sekvos. Kaj mi vokas al ĉiuj homoj de bona volo:

HELPU MIN FORMI PLI BONAN MONDON. NI POVAS FARI NUR TION, KIO EBLAS AL HOMOJ, SED TION NI POVAS

KAJ VOLAS FARI!

Dio benu nin!

(Facile la leganto rimarkos, ke tiu parolado restis neeldirita. Domaĝe! Verkis ĝin en germana lingvo Dagmar HOFFMANN, Heidenheimer Friedensgruppe)


sendis: Adolf BURKHARDT



*Nia peranto en rusio, Larisa KUZMENKO, kiu loĝas en la urbo N.Tagil, sendis al ni artikoleton de Andrej KONONOV pri*

## KRUCO SUR LA MAPO

Estas interesa fakto pri nia urbo: Se oni signas sur la mapo ĉiujn malnovajn preĝejojn kaj lagas ilin per linioj, oni ricevas la pravoslavan krucon kun la klinita, malsupra trabo. La kruco estas simetria kaj orientas sin sud–orienten. Kio ĝi estas? Ĉu tio estas laŭplanaj konstruaĵoj aŭ la volo de Dio? Jen la punktoj de la kruco:




① Enir–Jerusalema templo. Estis konstruita en la jaro 1774 kaj detruita en 1930.

② La preĝejo de Prezento de la Dipatrino en la Templon. Konstruita 1830, detruita 1930.

③ La templo Aleksandr Nevskij. Konstruita 1870, restaŭrita 1995. Templo kun la simila arkitekturo estas nur en Parizo.

④ La Sankta Trinitata Preĝejo. Konstruita 1877, fermita 1934, redonita al la kristanoj 1991.

⑤ La kapelo apud la malsanulejo. Ĝi estis detruita dum la Soveta periodo.

⑥ La Kasana Preĝejo (dediĉita al la Kazana ikono de Dipatrino). Estas la sola preĝejo, kiun oni ne detruis dum la Soveta periodo.

⑦ La Nikolaja Preĝejo. Konstruita 1835, fermita 1930, detruita 1964. Ĝi estis konstruita laŭ la projekto ke la Kristo–Savanta Templo en Moskvo. Ĝi estis la kripto de Demidovoj, la grandaj industriistoj de Uralo.



*Foto de malnova foto de la preĝejo Eniro de Jerusalemo.*

*Misia grupo en mia urbo donadas al mi sian internan informilon. En la lasta numero de pasinta jaro mi legis personan ateston pri preĝosperto. Mi pensas, ke ĝi interesos ankaŭ legantojn kaj tradukas ĝin:*

Karaj gefratetoj, mi ĝojas, ke mi povas scii-gi al vi, kiel Dio agas en mia vivo. Vi jam certe scias, ke mi laboras preskaŭ unu kaj duonon de jaro en entrepreno fabrikanta specialaĵon de nia urbo, dolĉajn tubetojn. (Laŭ diro estis tio ŝatata manĝaĵo de Napoleono. Lia kuiristo revenante el Rusujo ĉi tie malsaniĝis, ekamis unu civitaninon, restis en urbo kaj komencis fabriki tiujn tubetojn. Rimarko de tradukanto.) Nomon de entrepreno mi ne nomos, por ke oni ne riproĉu, ke mi faras reklamon. Temas pri laboro, en kiu Dio min algvidis kaj mi estas pro tiu laboreblo tre dankema. Sed ankaŭ estas vero, ke dum tiu jaro mia aŭdkapablo malpliboniĝis. Kiam mi komencis labori, mi aŭdis preskaŭ ĉion, kion oni flustras en la dua flanko de laborejo. Kaj nun, precipe en lasta monato, ekestis situacio, ke homo staris kontraŭ mi, kaj dum maŝino estis ŝaltita, mi aŭdis sonon de vortoj sed ne komprenis. Por iom ekkompreni pri kio estas parolo mi penadis el movo de lipoj ion ekkapti. Pli kaj pli ofte mi malfermadis buŝon strebante plibonigi aŭdkapablon sed senrezulte. Laste mi anoncis min por kontrolo ĉe orelkuracistino je la 27a de novembro.

Sinjorino kuracistino traventumis ambaŭ orelojn kaj sendis min al aŭdprovo. Mi devis malfermi miajn okulojn por koncentriĝi por sonoj el aparato. Situacio de aŭdkapablo aperis sur videbla grafo. Ciferojn mi ne scias. Kuracistino forŝovis paperon for de mi. Poste tre grave diris, ke mi devas min ŝirmi kontraŭ bruo, ĉar „novajn orelojn neniu donos al mi". Mi devos esti memgardema tiurilate. Laste ŝi donis al mi pulvoron kun vortoj: „Neniun miraklon atendu per tio!" Enspirite mi diris al mi: „Miraklo ne povas veni per pulvoro sed el mano de Dio".

Pasis unu semajno kaj nenio okazis. Daŭre mi malfermas buŝon sed ankaŭ daŭre mi aŭdas sonojn de vortoj sen kompreno. Mi preĝis, ke Dio gloriĝu en mia vivo. Mi diris al li, ke mi kredas akcepti resanigon el lia mano. Sed venis fino de dua semajno kaj ĉio senŝanĝe. Laste je la 10a de decembro dum diservo mi kuraĝis esprimi peton pri porpreĝo kaj frato Petro preĝis... Ian varmon mi nur sentis je la dekstra flanko sed nenio okazis.

Mi sidas, aŭskultas diservon, malfermas buŝon por iom kompreni predikon kaj — subite — „lup" en oreloj. Mi aŭdas! Ho, Dio, estas tio ebla? Ne estas tio sonĝo? Estos tio daŭra? Ĉu mi devas eksalti kaj krii, ke Dio resanigis min? Haleluja! Mi dankas, Jesuo! Mi sidas kaj mia koro jubilas en ĝojo. Post diservo mi diras al gefratetoj, kio okazis.

Je la 11a de decebmro 2000, la 13a horo, kontrolo ĉe sinjorino kuracistino. Tiu enrigardis aŭdiografon akiritan antaŭ 14 tagoj kaj sendas min denove al kontrolo de sonoj 4000–7000 (terminon mi ne scias). Ho, Dio! Sufiĉe baldaŭ mi aŭdas. Haleluja! Rezulto estas videbla sur grafo. Do, miraklo surgrafe! Por mi estas plej signifa fakto, ke mi aŭdas kaj vortoj de kuracistino: „Mi ne komprenas tion, sed situacio normaliĝis. Pulvoron vi jam ne bezonas". Kaj ŝi sidas ĉe komputilo, kaj mi vidas tiun surprizitan esprimon en vizaĝo elparolantan demandon, kiel tio estas ebla.

Ho mia Dio, mi dankas, ke Via Vorto estas fidela same kiel Vi estas fidela. Mi dankas ankoraŭ al Vi ĉiuj, kiuj alportis preĝon de koro por mia resaniĝo. Mi amas vin!

Martina

(Josef Pokorný)





*„En sia mizero li ekpetegis la Eternulon, sian Dion, kaj li tre humiliĝis antaŭ la Dio de siaj patroj. Kiam li preĝis al Li kaj petegis Lin, Li aŭskultis lian peton kaj revenigis en Jerusalemon al lia regno. Kaj Manase eksciis, ke la Eternulo estas la vera Dio"* (2 Kron. 33:12–13).

Li estis tre juna kaj ankaŭ tre bonŝanca supreninrinte la tronon de siaj prapatroj. Lia patro estis pia viro, sed li elektis esti malpia. Li ofte ebriiĝis kaj per aŭtoritato eĉ en sia juneco misregis siajn regatoj. Li estis tiel kruela ke li oferis siajn infanojn al falsaj dioj. Ŝtonkora reĝo, kiu ne aŭskultis al riproĉo eĉ de la sankta Dio. Tamen li finis sian vivon farante bonon.

La viro estis Manase, la viro kiu sekvis sian patron, Ĥizkijan, kiel reĝo de Judujo je la juna aĝo de dekdu kaj regis dum kvindek kvin jaroj.Ĉar li estis infano de pia homo, oni antaŭvidis ke li sekvus la paŝojn de sia patro. Tamen li elektis sekvi la malbonajn ekzemplojn de la antaŭaj reĝoj de Izrael kaj Judujo. Li eĉ faris pli da malbono ol ili.

El la kruelegaĵoj de lia regno estis jenaj: Sekvado de la abomenindaĵoj de nacioj aliaj; rekonstruado de la altaĵoj de adoro de falsaj dioj kiujn lia patro, Ĥizkija, antaŭe detruis; konstruado de la altaĵoj al la tuta armeo de la ĉielo; esplorado de estonteco; aŭgurado; sorĉado; kaj plej malbone, li oferis siajn infanojn al falsaj dioj. Laŭ tradicio, li mortigis la profeton Jesaja. Kia kruelega reĝo!

Ĉar li estis sub la Dia regno de Eternulo, Dio sendis al li kaj liaj regatoj multajn de Siaj profetoj avertante ilin, sed ili ne aŭskultis. Tial, Dio permesis al alia kruela reĝo, la reĝo de Asirio, venki lin kaj preni lin en ekzilon. Reĝo kiu iam estis servata nun fariĝis sklavo kiu servis alian reĝon.

Fine, en sia aflikto, li rememoris sian Dion. Li humiligis sin antaŭ Dio. Li konfesis siajn pekojn kaj pardonpetis. Pro lia vera pento, Dio redonis al li lian regnon.

Ricevinte sian regnon, li returnis sin al Dio servante Lin kaj farantebonon. Li plilongigis la muron de Jerusalemo; li formetis la altaĵojn de adoro de falsaj dioj kiujn li iam metis en la templon, kaj ekservis la veran Dion.Efektive, la skribintoj de la Sanktaj Skriboj parolis bone pri liaj postaj tagoj (vidu 2 Kron. 33).

Kia estis antaŭa historio via? Ĉu vi malboniĝis vian vivon? C'u vi suferas pro viaj pasintaj pekoj? Ne ĉio estas perdita! Dio kiu restarigis Manaseon povas fari same al vi. Vi povas atingi multon per Dio, nur se vi povus humiligi vin antaŭ Li. Konfesu viajn pekojn kaj turnu vin al Li. Estos bone por vi!

En la servo de Dio

pastoro Bayo Afolaranmi

## NUR UNU KONFESIO

John WESLEY estis la fondinto de la metodista eklezio. Iun nokton li sonĝis, ke li estis mortinta kaj survoje al la eterneco. Jen li venis al grandega portalo kaj demandis:

— Ĉu ĉi tie estas la ĉielo?

— Ne, la infero!" — estis la respondo. Li ektimis, sed demandis plu:

— Ĉu tie ankaŭ estas homoj el la angla korta eklezio?

— Jes, tre multaj!

— Ĉu ankaŭ baptistoj?

— Tre multaj!

Jen pensis Wesley al sia propra eklezio kaj demandis: — Ĉu tie ankaŭ estas metodistoj?

Denove eksonis la respondo: — Jes, tre multaj!

Li teruriĝis kaj kuris al la ĉiela pordo. Haste li demandis: —Ĉu estas metodistoj en la ĉielo?

— Ne, ne eĉ unu!

— Sed certe luteranoj?

— Ne, neniu!

— Sed eble reformitoj aŭ baptistoj?

— Ne, ne eĉ unu!

Terurplene li elvokis: — Do, kiaj homoj estas en la ĉielo?

La respondo estis: — Ĉi tie nur estas pekuloj, kiuj per la sango de Jesuo justiĝis!

En la ĉielo ekzistas nur unu konfesio, la konfesio al la ununura Sinjoro kaj Savanto, kiu elaĉetis kaj savis nin.

*Estas unu korpo, kaj unu Spirito, kiel ankaŭ vi estas vokitaj en unu espero de via voko; unu Sinjoro unu fido, unu bapto, unu Dio kaj Patro de ĉiuj, kaj en ĉiuj.* (Efesanoj 4, 4–6)

El libreto „Postvivaj rakontoj por ĉiu tago" de Axel KÜHNER, DE
esperantigis Siegfried KRÜGER, DE

## JESUO KRISTO, NIA AMIKO

Estimataj, ĉi-semajne, la konfesio de la niĝeriaj baptistoj okazigas sian 90an ĉiujaran kunvenon ĉe la urbego Port Harcourt. Do mi sendas ĉi tiun „Spiritan Digeston" el la urbego. Mi sentis ke mi admonu vin per la temo de la kunveno: JESUO KRISTO, NIA AMIKO.

*„Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed mi nomas vin amikoj, ĉar ĉion, kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi"* (Joh. 15:14–15).

Simple, amiko estas viro, kiu estas ligita kun alia per reciproka inklino. Jesuo Kristo nomas nin Siaj amikoj pro Sia amo por ni. Tamen, la kondiĉo de la amikeco estas farante tion, kion Li ordonas. Kelkaj el tiuj ordonoj estas jenaj: akcepti Lin kiel vian propran Savanton kaj Sinjoron (Joh. 1:12); ami unu la aliajn (Joh. 15:13); kaj atesti pri Li al aliaj homoj (Mt. 28:19–20).

La implico de ĉi tiu amikeco estas ke ni havas Iun, Kiun ni povas alkuri en la tempo de problemo. Ni havas Iun, Kiu povas kompati kun ni en nia malpotenceco (Heb. 4:14–15). Ni havas Iun Kiu eĉ helpos nin trovi solvon al niaj problemoj.

Ĉu Jesuo Kristo estas via amiko? Ĉu vi vere akceptis Lin kiel vian propran Savanton kaj Sinjoron? Ĉu vi plenumas Liajn ordonojn vere amante aliajn homojn? Kiomgrade vi engaĝiĝas pri Lia granda komisio de evangelio?

Kian amikon ni havas kiel Jesuo Kristo! Li estas tie por vi en la tempo de problemo. Li estas tie kompatianta kun vi kaj eĉ helpanta vin trovi solvon al viaj problemoj.

JESUO KRISTO JA ESTAS NIA GRANDEGA AMIKO!

En la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI



# LA EDZINO MALICA

Mi aŭdis la jenan rakonton kaj ploretis. Kunpastoro rakontis ĝin al mi kaj do ĝi estas vera.

Sinjoro Ikso fondis eklezion kaj post nelonge ordinis sian pli junan fraton Ypsilono, por pastri ĝin kiam ajn li forestis, ĉar la fondinto ĉiam vojaĝis.

La juna ordinito bone pastris la eklezion dum foresto de sia frato. Venis tempo ekpensi pri geedza afero. Li vidis junan fraŭlinon belan en la eklezio, alparolis ŝin pri lia deziro havi ŝin kiel edzino.

Post laŭrutina sekcio de preĝo por akiri, tiel-dirite, ĉielan konsenton, la fraŭlino jesis al peto de Ypsilono kaj ili geedziĝis. Sed ĉio ĉi okazis nur 6 monatojn post ilia unua renkontiĝo.

La edzino Ba estis vere bela kaj povis sufiĉe sendepende finance subteni sin. Ŝi, kiel komercistino, havis bonan financan fonton. Do ankaŭ pro tio Pastro Ypsilono geedziĝis kun ŝi.

La geedza ceremonio estis unuaranga! Ĉiu ĉeestinto preĝis. „Ho Dio estu tiel mia sorto, kaj la sorto de miaj gefiloj". Sed certe dum la ceremonio ekfinis, tiuj jam ŝanĝus siajn preĝojn. „Ho Dio, estu alie...", ĉar okazis akra disputo inter la nov-edzino kaj la fratino pli aĝa de la nov-edzo. Oni aŭdis insultajn kaj malbenajn vortojn reciproke flugantajn, jen de unu, jen de alia. Ne gravas la kialo, sed, kial tiun tagon? La lasta vorto de la nova edzino estis, ke Ma, la fratino de ŝia edzo neniam risku viziti la hejmon de la nova geedzparo. Kaj dum sole hejmenveturis la du tiun tagon. Ba diris al Ypsilono, ke ŝia averto, ke Ma neniam viziti ilin ne estas ŝerco. Por malebligi katastrofon, ŝi ne vizitu. Sed la edzo estis tiom laca ke li ne respondis. Ankaŭ li ne prenis ĝin serioza.

Vespere tiun tagon, kiam sole kuŝis la nova geedzo, Ypsilono, nun certe ke amoro kun Ba ne plu estus konsiderata kiel peko, metis sian manon sur la buston de Ba por antaŭatentigi ŝin pri lia propono por tio, sed Ba frapis lian manon kaj forpuŝis ĝin kvazaŭ ĝi estus fekaĵo. La juna pastro penis regi sian humoron. Plendinte ke ŝia kialo por malvolo havi seksan aferon kun Ypsilono estis pro ega laceco, tamen ellitiĝis por longe kontroli kaj admiri ĉion kion oni donacis al ili dum la ceremonio. Dum tio okazis, ekdormegis la ege laca edzo.

La dua, tria, kvara... tago, ankoraŭ rifuzis Ba la pravan proponon de sia edzo. Ŝi finfine diris al li ke pro ŝia komerca afero, ŝi ne volis varti bebon ĝis forpaso de du jaroj. Sed ĉu tio ankaŭ malebligas seksan aferon?

Jen granda defio por la pastro. Al kiu li rakontu? Kiel li rakontu? Kun preĝo al Dio kaj bona konduto al Ba, li provis akiri ŝian favoron. Li aĉetis por ŝi ĉion kio eble mildigos ŝian koron, sed ĉio havis nenian efikon favoran.

Kiam li ne plu povis teni la aferon, li rakontis ĉion al sia frato, fondinto de la eklezio. Sed kiam tiu petis klarigon de Ba kaj tiu per ruzeco rakontis, konkludinte ke Ypsilono senĉese ĝenis ŝin pro ordinara seksa propono, la fondinto desapontiĝis pro la onidira konduto de lia frato.

Tago de mallumo! Tia estis la tago kiam la preĝejanaro sidiĝis por decidi pri la afero de sia pastro. Oni kredis ĉiun la mensogon de Ba kiun ŝi rakontis pri sia edzo. Oni ekskomunikis lin por unu jaron kaj duono. Eĉ kiam vizitis la pastro sian patrinon, la virino, memorinte ĉion kio Ba jam donacis al ŝi, diris: „Ho mia filo, kial vi volas forpeli tiun belan, bonkondutan edzinon vian?" Ypsilono nur povis responde plori, ĉar ankaŭ lia patrino kredis la rakonton malican de Ba. Ĉiu homo nun forturnis sin de li. Aŭ, ĉu eble li ja ne bonkondutis? Eble, laŭ la opinio de la multo, li estis riproĉinda.

Nun ke ĉiu homo jam forturnis sin de li, la sola al kiu li povis turniĝi, estis Dio. Li decidis apartigi sin de ĉiu homo por bone trakti sian destinon kun Dio. Do, sen diri al iu ajn, li iun matenon decidis eliri el la urbo. Li dum multaj tagoj fastis kaj preĝis ĉe iu loko izola.

Kiam li jam sufiĉe preĝis, li reiris al sia loĝloko, ne sciante kiaj problemoj atendis lin de la edzino malica. Li jam petis Dion doni al li gracon regi sian humoron kiam refoje insultos kaj malbenos lin la virino. Sed li ne sciis — ĉu dank' al Dio? — ke tio neniam plu okazos...

Atinginte la pordon, li ne bezonis ŝlosilon por malfermi ĝin. Kiam li tuŝetis la pordon ĝi memvole malfermiĝis, kaj malpleno salutis lin. Li falegis sur la plankon kaj ploris kiel bebo sed neniu konsolis lin. Nur la eĥo de lia voĉo revenis al li kvazaŭ por moki lin. Tiu diabla edzino forportis ĉion.

Nun, „kiu trov(as) edzinon, tiu trov(as) bonon" (Sentencoj 18:22), kaj do ja al edzo, ne maliculino, oni celu.

Pastoro Olúwábûnmi
Gabriel Nashó-Davies

## KION VI AMAS PLEJE?

*„La reĝo Salomono amis multajn aligentajn virinojn"...* (1 Reĝoj 11:1).

*„Ĉio estas por mi permesata, sed ne ĉio estas oportuna. Ĉio estas por mi permesata, sed mi ne volas sub io submetiĝi"* (1 Kor. 6:12).

*„Ĉio estas permesata, sed ne ĉio estas oportuna. Ĉio estas permesata, sed ne ĉio edifas"* (1 Kor. 10:23).

Li estis la plej riĉa reĝo en sia tempo. Estis, kaj estas, neniu tiel saĝa kiel ĉi tiu reĝo. Lin Dio favoris super ĉiuj aliaj reĝoj. Dio ja decidis starigi lian regnon eterne. Tamen, pro tio kion li amis, lia regno pecetiĝis.

Tiu estis reĝo Salomono kiun benegis Dio per grandego en saĝeco, komprenoco, kaj eĉ riĉeco. Krom la skribitaj leĝoj de Moseo, kiuj gvidis la popolon Izraelan, dufoje aperis Dio al li avertinte lin observi la leĝojn.

Ankoraŭ, aligentajn virinojn amis Salomono kaj permesis ilin turni lian koron kontraŭ lia Dio.

Havi multajn virinojn (aparte aligentajn) por reĝoj ne estas novaĵo. Ĝi estis diplomata rimedo starigi la regnon. Tamen, tio ne estas la Dia rimedo. Tiu rimedo kaŭzis la falon de Salomono.

Kion vi amas pleje? Ĝi estus prava kaj permesata, sed ĉu ĝi estas oportuna? Ĉu ĝi edifas? Ĉu tio estas la volo de Dio por vi? Ĉu Dio estus feliĉa pro tio, kion vi amas pleje?

Zorgu, por ke tio, kion vi amas, ne fariĝu via majstro kaj ne turnigu vin for de Dio.

En la servo de Dio,

pastoro Bayo Afolaranmi




# EPIZODO EL LA VIVO DE ORGENISTO

La preludo suferas, la postludo prosperas. Sufiĉe longan tempon mi ne plu estis ludinta en tiu preĝejo. Sed nun oni bezonis min, preskaŭ subite. Do, unue mi iras en la sakristion por esplori la lokajn apartaĵojn (hodiaŭ, en ĉiu komunumo oni ja trovas malsamajn regulojn por la Diservo). Mi ricevis la „agendon", rigardis ĝin, hezitis kaj demandis, ĉu oni efektive ne deziras preludon. Eble oni forgesis noti tion sur la slipo, mi pensis.

„Ni ne plu havas preludon, — respondis la deĵoranta presbiterino, — sed simple ludu unu se vi volas". Senpripense mi reagis: „Ne, ne. Kompreneble mi obeas la kutimojn ĉi tie".

Fakte, estas bela sento sidi sur la orgena benko dum la sonorilado: nenia korbatado antaŭ la unua tono, nenia nervoza ordigo de ideoj por la preluda improvizacio. Tamen, preskaŭ mi enviis la sonorilojn: Vi rajtas muziki, kaj mi sidadas senutile. Tiel mi meditis. Ĉesis la sonorilado. Silento. Ne malbone, komenci la Diservon kun silento, same kiel la katolikoj. Sed iom post iom en la preĝejo sentiĝis maltrankvilo, ĉar simple nenio okazis. Jen, la jam menciita presbiterino ekstaris, paŝis al la orgeno kaj flustris en mian orelon: „Ernesto, prefere tamen faru preludon, la pastro ankoraŭ ne venis, li hodiaŭ servas unue en alia preĝejo".

Do ek! Jen mia ŝanco! Salteta motivo el la Viena klasiko torentis en miajn fingrojn; mirinde oni povis plekti ĝin tra ĉiuj voĉoj, la orgeno estis plene feliĉa kaj mi ne malpli. Unu momenton antaŭ ol mi devus komenci duan movimenton, post la kadenco kaj kulmino, finfine venis la pastro. Mi ĝentile finis ludi kaj tiam povis aŭskulti, kiel komenciĝus la Diservo, se ne „intervenus" mia preludo. Proksimume tiel: „Bonan matenon, kara paroĥo. Mi salutas vin en ĉi dimanĉa mateno en nia preĝejo" ktp. — komencaj vortoj tute kiel en televido. Tiam fine la unua himno kaj nur post ĝi la bena saluto — tamen la pastro diras mem la respondan Amen kaj ne la komunumo, same li diras la doksologion post la psalmo.

Nu, nu, mi ne grumblu, sed estimu kaj ĝuu la liberecon de kristana homo.

Tamen, la forigita preludo igis min pripensi. Ĉu la orgenistoj ne povas proponi ion aŭskultindan? Ĉu la komunumo ĝissate aŭskutis la orgenon? Ĉu la homoj jam tiom alkutimiĝis al la ritualo de televida anoncisto, ke ili ne plu kapablas sekvi aliajn formojn de komenco? Aŭ ĉu la enira muziko fariĝis faktoro de ĝeno?

Mi ne trovis solvon en tiu mateno. Tamen mi ekmemoris ke en la najbara preĝejo, kie mi ofte orgenludas, la Diservo komenciĝas ankaŭ per bonveniga saluto fare de la deĵoranta presbitero, kiu tamen anoncas ankaŭ la preludon kaj nomas la orgeniston same kiel la pastron. Pli ol unu fojon tio ŝvitigis min, ĉar mi ja ne povas tro ripete diri: Kion mi ludos, tion mi nun ne scias — diru simple „improvizacio pri la enira himno".

Ankoraŭ aliaj pensoj movis sin tra mia kapo. Ĉu ili malaltigos vian honorarion? Ĉu eble ne ĝustas, kion oni tiel ekzalte asertas — ke preludo agordas la korojn? Kial do oni antaŭvidas postludon, kiun

## FONDAĴO EDUKADO — RUMANA VORTARO

Ekzistas landoj, kie oni ja lernas Esperanton, ekzemple Rumanujo.

Aperis en (monato, jaro) vortareto de Ionel Onet, „Dictionar de Buzunar Esperanto-Roman si Roman-Esperanto", tio estas „Poŝvortaro..." (kun pardonpeto pro ĉiuj mankantaj supersignoj kaj subsignoj — Rumanujo: jen nova kampo por alfabet-plibonigantoj).

Vi eble ne kredos sed la ekzempleroj jam elĉerpiĝis. Oni devas reeldoni ĝin. La nova eldono havos nomon kun ankoraŭ pli da super/sub-signoj: „Dictionar pentru incepatori", alivorte „por komencantoj".

Oni bezonas 300 eŭrojn por kunfinanci la eldonon. Se vi volas ebligi tion, bonvolu sendi vian kontribuon al UEA por la Fondaĵo Edukado. Bonvolu indiki „por rumana vortaro". Tiuj, kiuj donacos pli ol 30 (ĉu en ordo?) eŭrojn, ricevos kiel dankesperimon ekzempleron de la vortareto.

GBEGLO Koffi,
B.P. 13169, Lome, TOGOLANDO
e-poŝto: **esp.togo@cafe.tg**

---

apenaŭ iu aŭskultas? Miajn pensojn rompis la fin-vortoj de la pastro. Li publike dankis pro mia orgenludo. Kia embaraso por mi! Tiom da afablo mi reciprokis per furioza postludo, sed tuj sekvis la dua ŝoko: Ĉiuj restis sidantaj, aŭskultis kaj, kio tute konfuzis min, ili aplaŭdis! Nun mi vere ne plu scias, kio ĝustas rilate al orgen-ludado en Diservo.

Ernst LEUZE
tradukis Adolf BURKHARDT

## Antaŭ viaj okuloj

Jen antaŭ viaj okuloj
Pereadas multaj uloj,
Vi fermegas buŝon vian,
Ne pridiras l' amon Dian.

En vi ne estas motivo,
Vojon de eterna vivo,
Al pereanto ekmontri,
Dian la amon demonstri.

Ĉu eterne vi silentas,
Neniam pasion sentas
Al tiuj la koroj velkaj
Kiujn levus vortoj kelkaj?

Leviĝu ni senprokraste
Kaj ekprediku tre vaste
L' evangelion de Jesu,
Al Dia voko ni jesu.

Olúwábùnmi Gabriel ÒSHÓ-DAVIES
(20/12/1998)

Mi ricevis la jenan korespond-peton, al kiu mi ne povas respondi, sed eble iu inter vi:

Juna (27-jaraĝa) porinfana instruisto: José de J. Campos Pacheco, Calle 10% 29y31 escl 2908, piso 3, apt F-6, Pedro Betancourt-Matanzas, Kubo 42700.



# LERNO-KOMPLETO DE ILEI

Nia instruista ligo pretigas lernilojn precipe por pli junaj lernantoj kaj koncentras la atenton al studiloj uzeblaj internacie, alivorte, en kiuj aperas nur Esperanto. Ili estas preparitaj lau la ideoj de komunika instruado, nome ke la baza lingva unuo estas la frazo, kaj oni de la komenco uzas la lingvon aktive por dialogi, komunikante ideojn kaj nociojn.

Por komencantoj, la propono estas Okuloj, 44-paĝa kolore ilustrita kajero, pretigita por infanoj inter 6-10 jaraj. Ĝi prezentas 440 radikojn, el kiuj pli ol kvardek estas verboj — la motoroj de la frazoj. Ili aperas en adekvataj kuntekstoj, tiel ke lernantoj tuj dekomence scias ne nur la verbon sed ankaŭ la uz-manieron — kun aŭ sen rekta objekto. Aperis ankaŭ Okulo Gvidilo por la instruisto aŭ kursgvidanto. Ĝi resumas por ĉiu paĝo de la studenta kajero la novajn vortojn, gramatikaĵon, komunikajn lertojn, kaj krome prezentas praktikajn konsilojn kiel prezenti la paĝon kaj kiujn pliajn agadojn au ludojn oni povas uzi. La dua parto de la gvidilo prezentas fotokopipretajn ekzercojn, tiel ke instruisto povas mem tre facile pretigi task-foliojn por la klasanoj, ŝparante la tempon mem krei ilin.

Por daŭrigi la kursojn ekde la fino de la studado de „Okulo", ni proponas kajerojn du kaj tri de la serio Tendaraj tagoj. Tiu transiro eblas, ĉar Okulo kovras la saman vort-trezoron kaj gramatikon kiel la unua kajero de Tendaraj Tagoj, kiu ne plu estas havebla de ILEI (sed eble restas ĉe iuj libroservoj). La dua kajero estas unuavice destinita por lernantoj inter 10-16 jaraj; gvidila materialo por ĝiaj komencaj paĝoj estas troveblaj en la hejmpaĝo de ILEI. La tria kajero de Tendaraj tagoj konvenas por ĉiuj lernantoj pli ol 10-jaraj, ĝi estas uzebla eĉ por kursoj de la supera nivelo. Kiel aldona helpilo ni proponas grandformatan kantlibron de norvega kolego. Oni povas trovi pliajn informojn pri ĉi tiuj verkoj en la hejmpaĝo **www.edukado.net.**

Okulo, kajero 1, 44p, ilustrita de Monika Molnar. EUR 4,50. Okulo, Gvidilo por kajero 1, ilustrita de Monika Molnar. EUR 4,50. Tendaraj tagoj, kajero 2, 72p. ilustrita de Pavel Rak, EUR 6,90. Tendaraj tagoj, kajero 3, 76p. ilustrita de Pavel Rak, EUR 6,90. Fantaziajxoj kaj kantoj por infanoj, Jon Rommesmo, 100p. EUR 3,60.

Mendeblaj de la libroservo de UEA (triona rabato ekde 3 ekzempleroj por Tendaraj tagoj, ĉiuj titoloj plus sendokostoj).

Mendeblaj de ILEI (Poŝte: Pannonia u. 30 I 6, HU-1136 Budapest.

Rete: **stefan.macgill@galamb.net**), triona rabato por ĉiuj verkoj ekde 3 ekzempleroj de ajna titolo, sendokostoj inkluzivitaj.

### Esperanto Junul-Kurso

Fare de Eldonejo HEJME, Pollando, reaperis konata lernolibro de Esperanto por junularo, originale verkita de SAT-Amikaro, *„Esperanto Junul-Kurso"*.

La lernolibro konsistas el du apartaj kajeroj:

1. Parto esenca 84 paĝoj riĉe ilustritaj, — entute en Esperanto — prezo 6 EUR (triona rabato ekde tri ekzempleroj).

2. Helpilo por instruistoj — pola-Esperanta — senpage por polaj kurso-gvidantoj. Por bibliotekoj, ktp. — prezo 1 EUR.

Mendojn akceptas la eldonisto:
Eldonejo Hejme
skrytka 59, PL 41-250 CZELADŹ
**esperanto@hejme.e-tools.pl**

# LA PORTUGALA VERSIO DE LA LIBRO „ESPERANTO: LA NOVA LATINO DE LA EKLEZIO" DE ULRICH MATTHIAS

La samideanoj en Rio kaj ĉirkaŭaĵoj estis invitataj viziti la budon de Eldonejo Pontes por koni la libron, kiu post la publikigo de „Bilinguismo" (José Passini) kaj „O Desafio das Línguas" (Claude Piron) estas la tria verko rilata al esperanto en la katalogo de tiu fama lingvistik-faka eldonejo.

Foirejo: Rio-Centro, Rio de Janeiro

Periodo: 17a ĝis la 25a de majo

Loko: Pavilhão Vermelho, budo 37

Titolo: Esperanto, o novo latim da Igreja e do > Ecumenismo > Prezo: R$20,00 >

Mi tre ĝojas pri tiu informo. Estas interese, ke fine kristanaj esperantistoj en diversaj landoj ekkoncsias, ke necesas kaj eblas informi pri Esperanto en la servo de la evangelio ankaŭ en naciaj lingvoj. Jen la listo de eldonoj aperintaj en presa formo: — La germana originalo: *Esperanto, das neue Latein der Kirche.* — Versio en Esperanto: *Esperanto. La nova latino de la eklezio.* — Angla traduko: *Esperanto. The New Latin for the Church* (el Esperanto tradukis Mike Leon kaj Maire Mullarney) — Rusa traduko: *Christianstvo i esperanto* (kun aldona ĉapitro pri Esperanto kaj ortodoksa eklezio) — Portugala traduko: *Esperanto, o novo latim da Igreja e do Ecumenismo.*

Pri alia libro mi deziras atentigi interesatojn: La psalmo 23 en la lingvoj de Eŭropo, inkluzive de Esperanto, de la hebrea originalo ĝis versioj en alemana (traduko de Bernhard Eichkorn), ŝvaba (mia gepatra lingvo), ne forgesante la maltan, islandan. Detalojn mi volonte sendos al ĉiu kiu petas min. La eldoninto estas Gerhard Adler, la eldonejo Blaue Hörner Verlag Marburg an der Lahn, la ISBN-numero 3-926385-12-X. En mia librejo, oni pagas 14,80 € (do 5 € malpli ol por ADORU).

Nepre havinda estas la nova mini-diskedo OekuRom, kiu surhavas du kompletajn bibliojn (germana unueca traduko kaj la Londona Esperanta, tamen kun la duakanonaj libroj), krome „midiojn" — komputilajn dosierojn por la melodioj de ADORU — kaj aliajn tekstojn, i.a. la tekstoj de Oekumenisches Esperanto-Forum de la komenco ĝis la n-ro 45. Ĝin sendas pastro Eichkorn kontraŭ 5 € aŭ eble via libroservo. (Mi nun komencas verki la jubilean numeron 50; kontribuojn mi forte bonvenigas, egale en kiu lingvo.)

Antaŭ kelkaj tagoj estis subskribita la definitiva mendo por nova eldonkvanto de la „Londona Biblio" — presota en Hongkong, en simila formo kiel la konata libro, sed kun unu signifa diferenco: ĝi enhavas ankaŭ la Duakanonajn Librojn de la Malnova Testamento, tradukitaj el la greka de Gerrit Berveling (kiel konate, Zamenhof tradukis el la hebrea, kaj li tradukis nur la tekstojn verkitajn originale en la hebrea). Daŭros plurajn monatojn ĝis la verko atingos Eŭropon. Ĉefa distribuanto por IKUE estos pastro Bernhard Eichkorn; stokon havos la KELI-sekretariino Els van Dijk en Nederlando kaj la presisto kaj eldonisto de DIA REGNO, Kazimierz Leja en Pollando.

## La revuo de TEJO: KONTAKTO

Vojaĝoj estas parto de Esperantujo. Danke al vojaĝemaj kaj aventuremaj esperantistoj naskiĝis Pasporta Servo kaj aperis specifa tavolo de nia kulturo. Ĝuste al vojaĝoj estas dediĉita la tria ĉi-jara numero de Kontakto — soci-kultura revuo de TEJO eldonata de UEA.

Tiu eterna temo ĉi-foje estas prezentita iom neordinare: krom historioj de nuntempaj vojaĝoj (kaj ne nur E-vojaĝoj), temas ankaŭ pri la unuaj vojaĝoj de esperantistoj, entreprenitaj antaŭ pli ol cent jaroj!

Depende de via loĝlando, la abono (6 numeroj) kostas inter 9 kaj 19 eŭrojn. Por aboni Kontakton turnu vin al la CO de UEA: uea@co.uea.org. Por ricevi senpagan provekzempleron sendu mesaĝon kun via tradiciposta adreso al la CO de TEJO: oficejo@tejo.org.

Se vi deziras havi skanitan bildon de la plej lasta kovrilo, bv. peti ĝin de la redakcio: kontakto@tejo.org.

Renato Corsetti

---

Multaj el vi jam scias, ke pro ne kontentiga farto mi devis nuligi multajn promesojn pri partopreno aŭ kunlaboro, de multaj monatoj. Plu, mi suferas pro ne klarigebla daŭra malforto kun diversaj vagaj doloroj. Tial ekde la mezo de junio, laŭ kuracista preskribo, mi estos kvar semajnojn en sanatorio en Bavario. Bonvolu noti, ke dum tiu tempo, oni ne povas rete atingi min (15 junio ĝis 15 julio). Mi firme esperas ke ĝis Rimini mi ree atingos staton kiu permesos al mi iri tien (sub conditione Iacobaea).

Dio benu! Kore salutas

Adolf Burkhardt

## LIRO-2003

La redakcio de „La Ondo de Esperanto" denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en tradicia literatura konkurso Liro-2003.

Liro-2003 havas kvin branĉojn.

1. Originala prozo: ne pli ol 30 mil literojn longa
2. Originala poezio: la amplekso ne estas limigita
3. Traduka poezio el la rusa lingvo: poemoj de Fjodor Tjutĉev
4. Traduka prozo el la rusa lingvo: „Ĉelovek v futljare" de Anton Ĉeĥov
5. Traduka prozo el la angla lingvo: „The Celebrated Jumping Frog of Calaveras County" de Mark Twain

En ĉiu el la branĉoj 1, 2, 3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Sendu tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro-2003 (RU-236039 Kaliningrad, p. k. 1248, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ la 1a de novembro 2003.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario poŝte kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono, aŭ rete (sezonoj@gazinter.net). Ili estas ankaŭ elŝuteblaj el nia retpaĝo http://Esperanto.Org/Ondo, rubriko „Literatura konkurso Liro", kie estas multaj informoj pri antaŭaj konkursoj.

La laŭreatoj de Liro-2003 ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2003. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2005 publikigi la ricevitajn

# JARA RAPORTO KEKO 2002

La fininta jaro 2002 estis por la Kristana Esperantista Konga Organizo, labora jaro. Sub la prezido de Pastoro Leonard MATONDO, la Prezidanto, realiĝis multaj revoj. Tiu deĵorperiodo estis por ni tre malfacila sed kun la beno de la ETERNULO, ni tamen sukcesis.

Pri la administrado, multaj mesaĝoj el interne kaj ekster kaj akiro de multaj administraĵoj.

Pri la instruado, ni estas fieraj anonci la malfermon de nia lernejo kie oni instruas la lingvojn interalie Esperanto.

Pri la statistiko, el 39 membroj malnovuloj aldoniĝis 5. Bedaŭrinde ke de 44 membroj, 15 estas tre viglaj kaj partoprenas aktive.

Pri la financoj, mi ne havas multe da tempo por detale skribi ĝin ĉar la tempo estas kalkulita, do mi volas nur ĝin fari resume.

## Financa raporto

| | |
|---|---|
| ***Enspezoj:*** | |
| Membrokotizoj | 60 $ |
| Donacoj | 50 $ |
| Honoraj membroj | 40 $ |
| Kursoj | 60 $ |
| Subtenantoj | 30 $ |
| | 240 $ |
| ***Elspezoj:*** | |
| Materialoj | 20 $ |
| Uzado de Reto | 50 $ |
| Luado de P.K. | 10 $ |
| Lugarantio por la lernejo | 90 $ |
| Kursmaterialoj | 30 $ |
| Diversaĵoj | 10 $ |
| Kongreskotizo | 20 $ |
| Sendokosto | 7 $ |
| | 237 $ |
| Do, la saldo estas: | -3 $ |
| Pri nia buĝeto: | |
| Enspezoj: | 203 $ |
| Elspezoj: | 310 $ |
| | 107 $ |

pastoro Leonard MATONDO
Prezidanto

---

## Sufiĉe granda

Vin mem
neniel pensu pli granda,
kvazaŭ ĉio vi estus,
neatingebla, kiel dio.
Ne ade troigu:
vi estas ĉiumomente
vi mem sufiĉe granda.

Neniel pensu pri vi mem,
kvazaŭ nenio vi estus,
nana, eta, la malo de granda,
sub ĉiu mezuro.
Ne bagateligu:
vi estas ĉiumomente
vi mem sufiĉe granda.

El: *Groot Genoeg*
*Gedichten van* Wim HESSELS
Tradukis Jacques TUINDER

---

konkursaĵojn en „La Ondo de Esperanto", libroforme kaj elektronike.

Sukcesojn!

La Ondo de Esperanto



# PROGRAMO DE LA EKUMENA KONGRESO

## Sabato, 30.8.03


Alveno. Ricevo de la kongres-dokumentoj en la kongresejo, Viale Carlo Zavagli 73.
**19:30** vespermanĝo en la hoteloj.
**21:00** interkona vespero en la salono de la paroĥo S-taj Johano kaj Paŭlo (kongresejo).

## Dimanĉo, 31.8.03

Diservoj kun Esperanto
**8:00** matenmanĝo en la hoteloj.
**9:00** kunveno en la kongresejo (preparo por la Diservoj)
**je indikota horo:** evangelia Diservo en la Valdana Evangelia Preĝejo, en Viale Trento, Rimini
**11:00** sankta meso kun la paroĥanoj de pastro Duilio MAGNANI en la preĝejo Johano kaj Paŭlo
**12:45** tagmanĝo en la hoteloj
**14:30** rozario en la preĝejo (libervole)
**15:00-15:45** kantado en la kongresejo
**16:00-17:00** ekumena Diservo en la preĝejo
**17:15-19:00** inaŭguro de la kongreso en la kongresejo
**19:30** vespermanĝo en la hoteloj.
**21:00-21:40** Albrecht KRONENBERGER: „La vivo de Max Josef METZGER (Maks Jozef Mecger)"
**21:45-22:25** Carmel MALLIA: „La spirita itinero de pastro DUN KARM (1971-1961), la malta poeto, en lia epiko: La <Mio> kaj Lia Pretero, estis ekzistencialista itinero"
**ĉ. 22:30** tagfina preĝo en la preĝejo Johano kaj Paŭlo.

## Lundo, 1.9.03:

**7:00** sankta meso en la preĝejo (libervole)
**8:00** matenmanĝo en la hoteloj
**9:00** ekumena matenpreĝo en la preĝejo
**9:30-10:15** kantado en la kongresejo
10:30-11:45 Miloslav ŠVACEK: Prelego pri la kongresa temo.




**12:00** tagmeza preĝo en la preĝejo (libervole)
**12:45** tagmanĝo en la hoteloj
**14:30** rozario en la preĝejo (libervole)
**15:00-15:50** klarigoj de la preĝejaj mozaikoj en la kongres-preĝejo fare de Duilio MAGNANI
**paralele: 15:00-18:00** la jara asembleo por la voĉdonado de UECI-estraranoj
**16:00-17:00** Mons-ro Giovanni BALCONI: „Ravenna, ekumena renkontiĝejo de oriento kaj okcidento"
**17:15-18:30** Zoltan ZOMHEGYI: Mezepoka art-historio de Nord-Italio kaj Ravenna, 2a parto
**18:45** vespro en la preĝejo
**19:30** vespermanĝo en la hoteloj
**21:00** Komuna kunsido de la du estraroj de IKUE kaj KELI (ne-publika)
— por la aliaj: libera vespero
**22:30** tagfina preĝo en la preĝejo Johano kaj Paŭlo

## Mardo, 2.9.03:

**7:00** ekumena maten-preĝo
**8:00** matenmanĝo en la hoteloj
**9:00-10:20** grek-katolika sankta meso en la preĝejo, celebrata de pastro Ignatiu DOBOS kaj kuncelebrantoj.
**10:30-11:05** Eugen Alexandrowiĉ LALENKOV: „Rusaj ortodoksaj martiroj sub la ateisma komunista diktaturo"
**11:15-11:50** Prelego pri San Marino
**12:00** tagmeza preĝo (libervole)
**12:45** tagmanĝo en la hoteloj
**14:30** ekskurso al San Marino kun man-sakoj de pagitaj vesper-manĝoj. Reveno je noktiĝo

## Merkredo, 3.9.03

**7:00** matenmanĝo en la hoteloj
**8:00** forveturo; tut-taga ekskurso al Ravenna kun man-sakoj de pagitaj tag-manĝoj. Gvidantoj en Ravenna: 1a grupo: gvidanto Antonio VACCALLUZZO (itallingve kun tradukisto), 2a grupo: gvidanto Zoltan ZOMHEGYI, 3a grupo: gvidanto kun tradukanto (pola buso), 4a grupo: gvidanto kun tradukanto? (ĉeĥa buso)
**11:00** Sankta Meso libervola
**11:00** Evangelia Diservo libervola
**17:30** Reveturo
**19:30** vespermanĝo en la hoteloj
**21:00** amuza vespero
ĉ. **22:30** tagfina preĝo en la preĝejo Johano kaj Paŭlo.

## Ĵaŭdo, 4.9.03

**7:00** sankta meso en la preĝejo (libervole)
**8:00** matenmanĝo en la hoteloj
**9:00** ekumena matenpreĝo en la preĝejo
**9:30-10:15** kantado
**10:30** jarkunvenoj KELI kaj IKUE
**12:00** tagmeza preĝo (libervole)
**12:45** tagmanĝo.
**14:30** rozario en la preĝejo (libervole)
**15:00-15:45** Arne LUNDQUIST: „La vivo de Sankta Birgitta"
**15:50-16:30** Siegried KRÜGER: „Dietrich BONHOEFFER (ADORU 490)"
**16:45-17:30** Dr Gottfried NOSKE: „Angelus SILESIUS"
**17:45-18:30** Gabriel ANDA: „Miaj impresoj pri Eŭropo, post kvar jaroj da restado, aŭ: Eŭropo, vidita de Afrikano"
**18:45** vespro en la preĝejo
**19:30** vespermanĝo en la hoteloj
**21:00-22:00** Ernst LEUZE: publika orgena koncerto (eble interŝanĝe kun alia vespero)
**22:30** tagfina preĝo en la preĝejo Johano kaj Paŭlo.

## Vendredo, 5.9.03

**7:00** sankta meso en la preĝejo (libervole)
**8:00** matenmanĝo en la hoteloj
**9:00** ekumena Diservo en la preĝejo
**10:30-11:05** Adolf BURKHARDT: „Paul SCHNEIDER, la predikisto de Buchenwald"
**11:15-11:50** Riccardo LARINI „Pri la martiroj — la plej konvinka Ekumenismo"
**12:00** tagmeza preĝo en la preĝejo
**12:45** tagmanĝo en la hoteloj
**14:30** rozario en la preĝejo (libervole)
**15:00** libera posttagmezo
**18:45** vespro en la preĝejo
**19:30** vespermanĝo en la hoteloj
**21:00-23:00** gaja adiaŭa vespero
ĉ. **23:00** tagfina preĝo en la preĝejo Johano kaj Paŭlo kaj vojaĝ-beno.

## Sabato, 6.9.03

**ekde 6:30** matenmanĝo en la hoteloj
**7:00** sankta meso en la preĝejo Johano kaj Paŭlo (libervole)
**9:00** oficiala adiaŭo.



# E-VID-E-NT-E DENOVE VOJAĜIS AL MOLDAVIO!

La 6an de majo pasinta mi — kune kun okulisto Nico DEKKERS (kun kiu mi anta kelke da jaroj misiis en Albanio) kaj optikistoj Henk BERTENS kaj Wim SCHOUTEN — por la dua fojo flugis al la plej malriĉa lando de Eŭropo. Sekvis poste Hans BAUMANN; li jam instalis brajlopresejon en la oficejo de la Ligo de Blinduloj en la moldava ĉefurbo Kisinevo kaj nun estas entreprenonta la starigon de laborejo por meblo-renovigo. Evidentas ke iom da lumo en tiu bankrota lando ne estas tro granda lukso! Por nia kampanjo ni ricevis denove substancan subvencion flanke de la nederlanda organizaĵo „Sovaĝaj Anseroj".

Invitis nin al tiu lando ne nur la Ligo, sed ankaŭ la Ministro de Justico. Li petis al la liliputa „Evidente" helpon specialistan al helpon bezonantaj prizonuloj. Ĉiu scias, ke la iama Agado E3 (= Esperantistoj esperigas esperantojn) bedaŭrinde fiaskis, ĉar nia diligenta kolegaro apenaŭ reagis. Ĝis nun ne prezentiĝis posteulo por disheroldi inter la uzantoj de la Lingvo de okulisto Zamenhof, ke tri el kvar blinduloj havas handikapon nenecesan, eviteblan, t.e. preventeblan aŭ kuraceblan. Do, tiel ŝajnis al mi, pli bone daŭrigi tiel ke mi ne plu perdas monon, tempon kaj energion, kvankam mi neniam malpermesis al esperantistoj imiti min aŭ kontribui brikon. La formulo estas simpla: 100% de ĉiuj donacoj kaj subvencioj rekte fluu al la projektoj.

La programo ebligis ke la teamo okulspecialista vizitis plurajn prizonojn, kie dekmilojn da malliberuloj trafas terura sorto. Tutmonde konata estas la fakto — legu ekz. eldonojn de Amnestio Internacia (ĉefe la t.n. Jarlibro donas monton da konkretaj informoj!) — ke homaj rajtoj estas malmulte respektataj. Miaj sindonemaj kaj ĉiutage energie laborantaj helpantoj kelkfoje konstatis, ke eblas sukcesa operacio. Ni mezuris centojn da okuloj kaj disdonis amason da okulvitroj por legado. Laŭ konsilo kaj rekomendo de nia okulisto, havanta vastan sperton kaj grandajn meritojn pro ofta laborado en evolulandoj (nia reĝino antaŭ nelonge distingis lin kavaliro) nia modesta fonduso finance ebligis ok operaciojn. La pasintan jaron ni servis tiumaniere al 27 operacieblaj pacientoj. Tiuj pacientoj devas pagi al siaj okulistoj duonjaran salajron, havante laboron, kaj tutjaran anstataŭpagon kiam ili perdis sian laboron. Mi konstatis ke pluraj t.n. socialaj entreprenoj estas fermitaj, ĉar iliaj produktoj ne plu vendeblas pro konkurencaj prezoj...

Aparte ĝojigaj estis la renkontiĝoj kun infanoj blindaj kaj malforte vidantaj. Ni klopodis okulvitre aŭ operacie iom plidolĉigi ilian sorton malluman. En sia dankletero la prezidanto de la Ligo, Dumitru SCLIFOS, skribis, ke la infanoj travivis varmigan ĝojon, ĉar ni ludis kun ili kaj disdonis donacetojn. Treege grave estas ke ili nun disponas pri brajlolibroj dank'al la bonege funkcianta nova presejo.

Mi havis kunsidon kun delegacio de la sportfederacio, ligita kun la Ligo. Oni preparas per diligenta trejnado partopre-

non de kelko da siaj plej bonaj atletoj por la antaŭparaolimpiko en la nederlanda urbo Assen (11-23 junio 2003) kaj postaj Paraolimpikaj Ludoj en Ateno (Grekio). Kaj jam evidentas la peto: ĉu via kaj aliaj fondusoj kapablas kaj pretas sponsori, ĉar tre altaj estas la kostoj?

Petu plurajn informojn al la adreso de Fonduso Evidente, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk.

UEA-konto: **jajt-s** aŭ poŝtbanka numero 10.20.100 (Stichting ZIeNDeROGen). Ĉiu helpo nepre bonvenas!

Dufoje mi havis la okazon renkonti esperantistojn. Ili venis al la ĉefurbo ankaŭ el aliaj lokoj de Moldavio. Nu, ĉar preskaŭ neniu parolas kaj komprenas la anglan lingvon, mi ĉiuminute sentis la grandan signifon kaj efektivan valoron de 'la bona lingvo'. Oni nur povas miri, ke 'la mondo' rifuzas lerni ĝin kaj preferas silenti, muti kaj mimi manpiede. Per financa helpo mi ebligis al sepopo da gesamideanoj vidhandikapitaj minibuse vojaĝi al la bulgara urbo Varna por ĉeesti tiean Esperanto-renkontiĝon por balkananoj, nome por tiuj al kiuj mankas mono por partopreni la IKBE-kongreson en Svedio okazontan. Mi povas tion fari, ĉar la ŝlosilvorto de Evidente ĉiam estis solidareco. Mi vidis kaj komprenis kiom ĝojaj ili estis! Do, kunsolidaru, geamikoj!

Venis nun la tasko pretigi kaj financi abundon da la receptaj okulvitroj. Kaj tio vere ne estas mia sola tempopasigo... Do, plej kore vin kaj la viajn salutas, anticipe dankante pro ĉiu sentebla kunlaboro.

Jacques TUINDER
Heemskerk, 22.05.2003

## Morto de membro

Shorty estis unu el la plej ĉarmaj personoj kiujn mi konis. Multajn renkontojn mi memoras tre vigle; ŝi tenis telefonan kontakton kun Tini ĝis preskaŭ la fino. En la kongreso en Bishop' s Stratford ŝi estis la dom-patrino kiu zorgis pri preskaŭ ĉio kio rekte tuŝis la eksteran bonfarton de la kongresanoj. Post Jönköping, kun ŝi kaj kun Marilu MUNGER, mi gastis ankoraŭ unu tagon ĉe Kalle BUREMO — estis ege ĉarma „postkongreso".

Kiam mi estis en Londono por la jubilea E-Diservo, ŝi poste veturis kun mi al sia fratino, kiu loĝis inter Londono kaj ŝia loĝkoko. Ni faris nur mallongan viziton ĉe tiu angla damo kvazaŭ el angla romano.

S-ino Ena SHORTLAND — tion ni skribis nur en listoj. Ŝi ĉiam estis Shorty, kiel Tini estis Tini. Oni trovos ŝiajn spurojn en la historio post „Nia Historio", ofte.

Kore,

Adolf BURKHARDT



*Shorty (Ena SHORTLAND) dum la kongreso en 1982.*



## Tagordo de la jarkunveno de KELI 2003

1. Malfermo
2. Elekto de la kunprotokolantoj.
3. Funebra memorigo.
4. Sekretaria jarraporto.
5. Kasista jarraporto
6. Raporto de la kaskontrolantoj.
7. Buĝetoj.
8. Jarraporto de la redaktoro de *Dia Regno*.
9. Esperanto Misio.
10. Estrarelekto.

Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de Jacques TUINDER (prezidanto), Philippe COUSSON (vicprezidanto kaj redaktoro) kaj la membroj Adolf BURKHARDT, Bengt Olof ÅRADSON, Irén BAGHI, Geoffrey DOROW.

Jacques TUINDER ne plu estas reelektebla kiel prezidanto de KELI. Li restas en la estraro kiel estrarano. Geoffrey DOROW ne plu estas reelektebla. Li postsekvis David FEATHERSTONE kaj same kiel David, li traktis la kontaktojn kun la Brita Biblia Societo pri la eldono de la Biblio kun la Duakanonaj Libroj. En majo Geoffrey subskribis nome de ni, la kontrakton por la presado en Hongkongo.

La aliaj estraranoj estas reelekteblaj kiel membroj de la estraro.

11. Kongresaj planoj.

Pavel POLNICKÝ proponis jam dum la jarkunveno en 2002, organizi Kristanan Kongreson en 2004 en lia lando. Ĝi okazos en Refreŝiga kaj Eduka Centro de lia eklezio en la Bystřice pod Hostynen en Moravio (31.7.-6.8.2004).

12. La estonteco de KELI.

Studinte la financan raporton de nia kasisto, vi certe rimarkis ke la membronombro malaltiĝas konstante. Ni havas zorgojn ĉar ne anoncas sin posteuloj por demisiantaj estraranoj. Tio okazas en multaj unuiĝoj nuntempe pro diversaj kaŭzoj. Nun venas la momento serioze pripensi kaj pridiskuti la baldaŭan estontecon kaj esplori kiel ni devas trakti la supre menciitan problemon. KELI estas internacia unuiĝo kaj kunigas kristanojn el multaj landoj kaj religioj. Kiel ni povos daŭrigi la laboron estonte?

13. Ideoj kaj sugestoj de la membroj.
14. Fermo.

## Krucvortenigmo

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | 2 | 3 | 4 | | 5 | 6 |
| | ■ | 7 | | ■ | 8 | | |
| 9 | 10 | ■ | 11 | | 12 | ■ | |
| 13 | | 14 | | | 15 | 16 | |
| 17 | | | | 18 | | | |
| | ■ | 19 | 20 | | ■ | 21 | |
| 22 | 23 | ■ | 24 | | 25 | ■ | |
| 26 | | | | | | | |

## Kromsolvo

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 9 | 17 | 20 | 6 | 1 | 12 |

***horizontale:*** 1. graco, 7. la unua virino, 8. sufikso por elementa peceto, 9. mallongigo de sankta, 11. valormetala, 13. esceptante neniun, 15. inklino, 17. nedifina persona pronomo, 18. sal' de nitrogen-hidrogen-acido, 19. arkforma akvomas', 21. interjekcio uzata por alvoki je telefono, 22. difina artikolo, 24. kontinent', 26. farigas.

***vertikale:*** 1. apostolo, 2. fabela estaĵ', 3. patroj de patro kaj patrino, 4. artikl' de komerco, 5. prefikso: denove, 6. grekite kristan', 10. pronomo persona, 12. isola dezerta loko, 14. entena objekto, 16. produto de cent per dek, 18. haki, 20. vizaĝpart', 23. mallongigo: antaŭ Kristo, 25. sufikso,

***kromsolvo:*** pastra kunveno.

Fritz LAUTENBACH

# AL ANA LA FLORO

Ho vi, amata de miaj dudek sep sensoj, mi amas al vi!
Vi, de via, vin al vi, mi al vi, vi al mi,
— ĉu ni?
Tio cetere, ne gravas nun!
Kiu Vi estas, virino ne-nombrita?
Vi estas, ĉu vi estas?
Oni diras ke vi estas.
Lasu ilin diri, ili ne scias kiel staras la preĝeja turo.
Vi portas vian ĉapelon sur viaj piedoj kaj promenas
sur viaj manoj,
sur la manoj vi promenas.
Hola, via ruĝa robo, dissegita al blankaj faldoj,
ruĝa mi amas vin, Ana la Floro, ruĝa mi amas vin,
al vi, de via, vin al vi, mi al vi, vi al mi,
— ĉu ni?
Tio cetere apartenas al la frida ardo!
Ho Ana la Floro, ruĝa Ana la Floro, kiel diras la homoj?

**Konkursa demando:**

1) Al Ana la Floro mankas kapo en la kapo.
2) Ana la Floro estas ruĝa.
3) Kiun koloron havas la klapo?

Blua estas la koloro de via flava hararo,
Ruĝa estas la koloro de via verda klapo.
Vi simpla junulino en ĉiutaga vesto,
vi kara verda besto, mi amas al vi!
Vi, de via, vin al vi, mi al vi, vi al mi,
— ĉu ni?
Tio cetere apartenas al la kesto fajra
Ana la Floro, Ana, A — N — A!
Mi gute verŝas vian nomon.
Via nomo gutas kiel mola sebo bova.
Ĉu vi scias, Ana, ĉu vi jam scias?
Vin oni povas palindrome legi.
Kaj vi, vi plej glora el ĉiuj,
vi estas sama ambaŭ-direkte.
A — N — A.
Bova sebo gutas karesi trans mia dorso.
Ana la Floro,
vi guta animalo,
mi — amas — al vi!

*Ĉi tiu poemo de Kurt SCHWITTERS al sia amatino dediĉita (balbutante) sonas je EXPO 2000 (DE, Hannower) en ĉiuj lingvoj de la tero. Ŝtatestroj kaj ambasadoroj ricevas kiel gastdonaco tradukon de Schwitters „Sonpentrarto" en la respektiva oficiala lingvo. Estas 154 lingvoj, bedaŭrinde Esperanto ne estis akceptita.*

Esperanto-versio de
Adolf BURKHARDT, 1999